

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 524

JUNIO 1949

KATALUNA ANTOLOGIO

kompilita de

JAUME GRAU CASAS

Ĉi tiu bele bindita volumo kun 400 paĝoj da poezio, popolanto kaj mirinda prozo malfermas por la mondo la pordojn al la alta kulturo kaj antikva tradicio de malgranda sed riĉe dotita popolo.

Kiam **KATALUNA ANTOLOGIO** aperis en 1927 la tuta literaturamanta publiko Esperantista ĝin salutis kiel modelon. Arango, prezento kaj prestekniko staras ekster kritiko. Ĉi tiu unika verko devas nepre trovi lokon sur viaj librobretoj.

Prezo 12 ŝil. 6 pencoj. Aŭfranko 9 p.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pecnoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Itallingvo-perfektigemuloj plensukcesos ! Legu jarlibron 1948 p. 153 ; 1949 p. 43.

Gvidlibroj kaj turismaj broŝuroj el ĉiuj landoj, en Esperanto aŭ kun esperanta traduko (novaj kaj malnovaj) estas kolektataj por propaganda celo. Interŝanĝe mi sendos similajn (hispane) pri Montevideo kaj belaj urugvajaj marbordoj. Se necese mi pagos moderan prezon. Prof. M. Fernández Menéndez, calle 21 de Setiembre 2405, Montevideo, Urugvajo.

Ĉi ni daŭre perdadu la fruktojn de nia laboro ? Tezo diskutenda de ĉiu E-grupo. Mendu, sendante 2 intern. respondkuponojn, ĉe Esperantista Klubo, Teplice, Ĉeĥoslovakujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Religio laŭ racio kaj konscienco. Ĉu estas eble ? Aŭ ĉu vi devas endormigi vian racion kaj konsciencon kiam vi eniras preĝejon ? Skribu al la Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj, S-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, London, S.E.22, Anglujo.

Kiuj geamikoj povos helpi familion kun kvin infanoj al laboro (viro metalisto) kaj domo en Suda Afriko aŭ Aŭstralio ? Skribu al J. K. Kuiler, Potchefstraat 14, Den Haag, Nederlando.

Kiu bonvolus vendi al mi la sekvantajn librojn ? 1, Lupo, hundo kaj homoj (de Dygasinski) ; 2, Sinjoro Tadeo ; 3, Sinjorino Twardowska (de Mickiewicz) ; 4, Quo Vadis ? ; 5, La Lanternisto (de Sienkiewicz) ; 6, La Patro de Pestuloj en El-Arish (de Slowacki) ; 7, Katolika Preĝlibro (de P. M. Carolfi) ; 8, En Okcidento Nenio Nova (de Remarque). Aĉetonto : S-ro Francisko Walas, str. Mickiewiczza 18, Bielsko, Pollando.

17-jara studentino dez. korespondi tutmonde per belaj p.k. ilustritaj. F-ino Elzbieta Cecylia Wiatr, ul Tetmajera 254, Bielsko, Pollando.

Komencantino dez. interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn kaj korespondi kun katolikaj Esperantistinoj en la tuta mondo. Adreso : S-ino L. Kress, Timorstr. 19, Heemstede, Nederlando.

Mi serĉas gekorespondantojn pri montgrimpado en tuta mondo. Respondo certa. Miloš Polák, gen. Svobody 58, Chomutov, Ĉeĥoslovakujo.

Juan Salvador, c/o Pintor Torres 140, Tarrasa, Hispanujo, fraŭlo 21-jara, deziras korespondi kun radio-teknikistoj kaj radioamatoroj de ĉiuj landoj kaj ankaŭ kun gesamideanoj.

Deziras korespondi pri biologio, naturkuracado, Ruĝa Kruco, turismo, Walther Gieseler-Fischer, Forstweg 79, Berlin-Frohnau, Germanujo.

Naturdiletantoj, botanikaj sciencistoj, profesoroj, studentoj ! Konsilinda estas akiro de granda kolekto da poŝtkartoj *Sovaĝaj Plantoj* de Fraŭlino Manuela Gallardo y Gómez. En kursoj ili anstataŭas la verajn floretojn kaj fungojn. Ujo kun plena kolekto (105 kolorkartoj) po 220 pesetoj ; 5 malsamaj 21-bildaj kolektoj po 50 pesetoj. Poŝtelspezoj entenataj. Informas kaj liveras : Prof. Boscá, Facultad de Ciencias, Valencia, Hispanujo. Korespondas esperante, angle, france, hispane, itale, kaj portugale.

Piot, 11 rue de Metz, Saint-Quentin, Aisne, Francujo, deziras korespondi kun junuloj (15-17-jaraj) : svedoj, norvegoj, nederlandanoj, angloj, kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Nepre respondos.

Deziras korespondi kun knabo dekokjara aŭ knabino, kies lingvo nacia ne estas angla, Malcolm Hill, 31 Lisvane Street, Cathays, Cardiff, Britujo.

Se vi sendos al mi 50—125 malsamajn bonajn poŝtmarkojn de via lando mi sendos saman kvanton el Svedujo. Respondo garantiata. S-ro Martin Warno, Valla, Svedujo.

Mi deziras korespondi—esperante, angle, aŭ france—kun ĉiuj okupiĝantaj aŭ interesiĝantaj pri matematikaj sciencoj, precipe pri astronomio. Z. Jastrzebowski, Wroclaw 12, skr. poczt., Pollando.

Pola oficisto deziras korespondi tutmonde. J. Jablonowski, ul. Zeromskiego 33-8, Wroclaw, Pollando.

INTERESAJ LIBROJ

Elektitaj rakontoj. Elin Pelin.

Trad. el la bulgara de S. Hesapčiev.
96 paĝoj, broŝ. 2ŝ. aŭ 8 rpk.

Koro. Libro por knaboj. E. de Amicis.

Tradukita el la itala lingvo.
316 paĝoj, broŝ. 6ŝ., bind. 7ŝ. 6p.

Noni kaj Mani. Jón Svensson.

Traduko de P. van den Hövel.
160 paĝoj, broŝ., 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk.

Diabla en la botelo. R. L. Stevenson.

Trad. el la angla de J. Seka.
48 paĝoj, 1ŝ. 10p. aŭ 7 rpk.

Rakontoj pri Nederlando. Georges Duhamel.

El la franca tradukis Roland Dupuis.
60 paĝoj, kun multaj ilustraĵoj. 3 ŝil.

Synnøve Solbakken. B. Bjørnson.

El la norvega tradukis E. kaj A. Weide.
96 paĝoj, broŝ. 2ŝ.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARO Junio 1949

N-ro 524 (6)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ⅛ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

LA TRIDEKKVARA KONGRESO

Por la kvina fojo la ĉefa manifestacio Esperantista, la Universala Kongreso, okazas en Britujo ; por esti tute preciza, la kvaran fojon en Anglujo kaj unufoje en Skotlando. La unua kongreso sur la brita insularo estis en urbo Kembriĝo, kaj estus interese scii, kiuj el la tiamaj kongresanoj ankoraŭ vivas kaj partoprenas ankoraŭ la movadon. La nuna kongreso en Bournemouth ja devus esti okazinta jam en 1947 por esti dankesprimo al la Brita popolo flanke de la Esperantistoj ! Kvar jaroj ne estas longa periodo, kaj tamen sufiĉa por forgesi, ke sen la firma sinteno brita en 1940 ni probable ne kunvenis en Esperantista kongreso. Tiu firmeco estis la unua bato al reĝimo, malamika je ĉio interfratiga kaj sekve je internacia lingvo.

La karakterizaĵojn de tiuj kongresoj oni povus resumi jene : En Kembriĝo estis inaŭgurita la internacia monsystemo kalkula, la *spesmilo*, ideo de ĝeneva Profesoro R. de Saussure. En Edinburgo la demando pri *Propagando per la lernejo* staris en la mezo ; Oksfordo diskutis la ne malpli gravan rolon de *Esperanto en radio kaj komerco* ; London (1938) ricevis la kvalifikon *harmonia kongreso*, ĉar oni ne parolis pri la organizo ! Laŭ ĉi tiu maniero distingi kongreson, ni devus nomi tiun en Bournemouth, la *Kongreso de dankamemoro*.

Tridekkvar kongresoj de 1905 ! Longa vico de regulaj konvinkaj pruvoj, ke Esperanto vivas kaj ne estas retorta lingvo. En dek kvin landoj ni kunvenis kaj la laŭlanda komparo montras, ke Svislando same kiel Britujo kvinfoje gastigis la kongreson. La jena listo montras la dispartigon :

Aŭstrujo (2), Belgujo (2), Ĉeĥoslovakujo (1), Finnlando (1), Francujo (3), Britujo (5), Germanujo (3), Gdansk-Danzig (1), Hispanujo (1), Hungarlando (1), Italujo (1), Nederlando (1), Pollando (3), Svedlando (2), Svislando (5), Usono (2).

Landoj, kie ni ankoraŭ ne kunvenis, estas Danlando kaj Norvegujo, krom la landoj balkanaj kaj Portugalujo. Eble ni iam povos kunveni en Irlando ; sed tio estas muziko de la estonteco. La okazigo de kongreso jam fariĝis vera problemo pro ĉi tiu limigo al kelkaj landoj disponantaj la maksimumon de elementoj por bona aranĝo. Ni tamen ne cerbumu nun, sed ĝoje preparu nin por iri al
BOURNEMOUTH, FONTO DE SANO KAJ PLEZURO !

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstralio

Elstara estas la jara raporto de la Esperanto-societo en Sydney pro tio, ke ĝi konigas kampon de agado, kiu verŝajne estas unika en la Esperanto-movado. Sub gvidado de S-ro Chandler, pli ol 100 infanoj korespondas eksterlande pere de Esperanto. Tio okazas sub aŭspicioj de la Teacher's Federation International Pen-Friendship Club (Klubo de Internacia Korespond-Amikeco de la Instruista Federacio). Pli ol dumil infanaj dokumentoj estis tradukitaj en 1948 kaj la nombro konstante kreskas. Per tiu laboro Esperanto estas ĉiam aktuala en la gravaj rondoj de instruistoj.

Komplemente al tiu laboro, la societo planas internacian ekspozicion de infanaj desegnoj laŭ la modelo de Richard Levin en Lyon, kaj oni jam varbis la intereson de eminentaj personoj inkluzive de la estraro de la National Gallery (Nacia Pinakoteko).

Brazilo

Dum 1948 Esperantista Societo de Porto Alegre (Rio Grande do Sul) ricevis tri oficialajn subvenciojn financajn. Tiuj estis:

(1) La Konsilantaro de la Komunumo de Porto Alegre aprobis je 20.12.1948 la komunuman Leĝon N-ron 158, sankciitan de la Komunumestro, ke al la nomita societo estu disponigita la sumo de 2.433.90 kruzejroj.

(2) La registaro de ŝtato Rio Grande do Sul aprobis dekretan, N-ron 507, je 18.12.48 ke estu disponigita por la biblioteko de la nomita societo la sumo de 3.000.00 kruzejroj.

(3) Post kelkaj tagoj la sama registaro per leĝo N-ro 522 je 28.12.48 aprobis la transdonon de 20.000.00 kr. por kulturaj aktivecoj de Esperantaj Societoj dum 1949.

Grava por la enlanda movado estis letero sendita de la Sekretariejo pri Edukado kaj Kulturo, kaj Centro por Eduka Esploro kaj Orientigo, kiuj havas sian sidejon en Porto Alegre. Donante apogon al Esperanto ĝenerale, la letero interalie tekstas jene:

“ Esperanto, lingvo artefarita, kun neŭtralaj kaj internaciaj ecoj, enhavas nediskuteblajn kvalitojn, kiuj pravigas ĝian enkorpiĝon en la heredan proprajn komunan al ĉiuj modernaj civilizitaj popoloj.”

La letero finiĝas per peto: “ tiu ĉi Sekretariejo rekomendas al ĉiuj instruistoj de la ŝtato Rio Grande do Sul specialan intereson al

tiu idiomo, petante ankaŭ, ke ili apogu kaj helpu ĝian disvastiĝon per ĉiuj rimedoj je sia dispono.”

Ĉeĥoslovakujo

El la protokolo de komitata kunveno de EAĈSR (landa asocio) ni ekscias kun intereso, ke pagintaj membroj je 15.3.49 estis 2626, el kiuj ne malpli ol 901 estis novaj!

La 7-a Ĉeĥoslovaka Kongreso okazos kun honora patroneco de la Ministro por Informoj kaj Klerigo, S-ro Václav Kopecký, la 4-6 de Junio en Liberec, (Šamánkova 4 a).

Germanujo

Okaze de la Germana Esperanto-Kongreso en Göttingen (3-9 Junion) oni funkciigos specialan poŝtejon kun aparta stampo por la kongreso. S-ro Rüdiger Eicholz, Postfach, (20b) Göttingen estas komisiita de la kongreso prizorgi la aferon, kaj nun sciigas, ke specialan kongresan poŝtkarton kun la stampo oni povos ricevi de li kontraŭ unu respondkuponon.

Gvatemalo

Raporto de S-ro J. Bonge el Centra Ameriko enhavas ĉiujn karakterizojn de pionira laboro. Enirinte Gvatemalon fine de 1946, li trovis la ideon de lingvo internacia tute nekonata. Hazaarta artikolo, kun multaj neveraĵoj pri helplingvoj, donis al li okazon viziti la redaktoron de *El Imparcial*, kiu poste publikigis Esperantan kronikon, kiun pli poste imitis la ĉefaj gazetoj de la ĉefurbo, *Diario de Centro America*, *Nuestro Diario* kaj *La Hora*.

Sekvis longà serio de artikoloj celantaj vekti la atenton de la legantoj pri Esperanto. Venis multaj informpetoj, eĉ el najbaraj urboj, sed la manko de hispanlingvaj propagandiloj—kaj de financaj rimedoj—malhelpis plenan ekspluaton de la situacio.

En Decembro 1947 S-ro Bonge starigis la unuan klubon, sed li baldaŭ konstatis la naturan indiferenton de la indiĝenoj, kiuj tre malvolonte klopodas pri aferoj. En aliaj lokoj politikaj konsideroj malpermesis la starigon de klubo. La 23-an de Januaro li parolis pri Esperanto en la Kongreso Bahaa en Gvatemalo, sed malgraŭ la bahaa maksimumo pri internacia lingvo, eĉ ne unu membro sin anoncis por kurso!

Praktikaj rezultoj estas kurso en la *Facultad de Humanidades* dum tri monatoj. Dua kurso nun funkcias. Notinde estas, ke la studentoj ne havas lernolibrojn! Kelkaj eksterlandaj samideanoj bonvolis doni helpon de tempo al tempo rilate al propagandiloj.

La Esperantista Kolonio ankoraŭ ŝvebas. Multaj baroj devis kaj devas esti forigataj. Venis 110 informpetoj (koncerne 800 personojn el 19 landoj). La tute afero estas dividita en 3 klasojn :

1. Entrepreno de ligno en la sovaĝa arbaro ; inkluzive de faligo de arboj ĝis fabrikado de artikloj, kemiaj derivaĵoj k.s.
2. Entrepreno de aluminiak artikloj.
3. Entrepreno de kemiaj produktaĵoj, de filmoj, de granda kampkulturo.

La decido pri tiuj dividoj estas rezulto de korespondado kun personoj dezirantaj enmigri en la landon. S-ro Bonge ankoraŭ petas, ke la personoj povantaj veni al Gvatemalo skribu detale pri siaj kapabloj, pri la entreprenoj fondotaj (nombro kaj specifiko de la maŝinoj k.s., ties prezo en usonaj dolaroj kaj kie oni povos akiri ilin) fakte, doni ĝeneralan budĝeton pri la tuta afero. Li krome atentigas denove, ke la migrantoj devas pagi siajn vojaĝkostojn aŭ ricevi subvencion de I.R.O. (International Refugee Organisation) kaj ili devos esti kapablaj vivi kelkajn monatojn sen enspezo, se necese.

Donu al S-ro Bonge plenajn detalojn pri ĉio farota. Adreso : S-ro J. Bonge, Guatemala Cd. Poste Restante, Guatemala, Centra Ameriko.

Italujo

La tria Itala Kongreso de Federalisma Eŭropa Movado, okazinta en Firenze 23-25 Aprilo, konstatinte ke lingvo internacia estas necesa por la rilatoj inter popoloj, aprobis rezolucion pri instigo al la uzado de Esperanto por la celoj de tiu movado.

Kongo Belga

S-ro Edward Symoens, profesoro en Elizabethstad, informas nin ke okazas kurso por la lernantoj de la Koninklijk Atheneum (Reĝa Ateneo) post lernejoj horoj, kaj dua kurso por plenkreskuloj dimanĉe en la sama lernejo. Tio estas interesa pro tio, ke tiuj verŝajne estas la unuaj Esperantaj kursoj iam donitaj en Kongo Belga.

Svislando

La jarkunveno de la Svisa Esperanto-Societo okazis en Häbernbach 23-24 de Aprilo. Ĝin antaŭis kurs-semajno kun 14 personoj.

En la jarkunveno prelegis kun filmo S-ro Robertson, propagandestro de Trans World Airlines (Transmonda Aerliniaro), pri flugvojaĝo al kaj trans Ameriko. Belgis la vesperon jodlista klubo en berna kostumo kaj samideano Herrmann montris sian talenton kiel iluziisto.

La tagordo enhavis la kutimajn aferojn. S-ro Liechti estis elektita prezidanto dum ankoraŭ unu jaro, kaj kun aplaŭdo oni elektis S-rojn

Ducommun kaj Jayet Honoraj Membroj de S.E.S. pro fidela laboro multjara. D-ro Jaccard disdonis diplomojn al la ekzamenitoj, inter kiuj troviĝis 14-jara knabo, rifuĝinto nun vivanta en Svislando. Li gajnis la superan diplomon. La bankedon gajigis akordeon-klubo de Huttwil kaj la prezidanto de la komunumo alparolis la kunvenintojn. Bone sukcesinta kunveno.

INTERNACIA KONKURSO 1949

Stato je la 30a de Aprilo 1949

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavujo	1600	2080	130.0
2. Svedujo ..	4100	4379	106.8
3. Portugalujo	700	745	106.4
4. Belgujo ..	1700	1611	94.8
5. Aŭstralio ..	950	880	92.6
6. Urugvajo ..	250	220	88.0
7. Britujo ..	13000	10687	82.2
8. Svislando ..	1400	1125	80.4
9. Usono ..	3000	2408	80.3
10. Polujo ..	4000	3160	79.0
11. Brazilo ..	2000	1492	74.6
12. Sud-Afriko ..	250	185	74.0
13. Germanujo ..	1600	1170	73.1
14. Finnlando ..	2000	1450	72.5
Italujo ..	1600	1160	72.5
15. Egiptujo ..	300	215	71.6*
16. Norvegujo ..	1300	900	69.2
17. Nederlando	5400	3715	68.8
18. Kanado ..	300	205	68.3
19. Argentino ..	900	605	67.2
20. Islando ..	500	315	63.0
21. Hungarujo ..	1800	1090	60.6
22. Nov-Zelando	900	535	59.4
23. Francujo ..	6200	3422	55.2
24. Irlando ..	300	150	50.0
25. Danlando ..	3200	1570	49.0
26. Aŭstrujo ..	1000	440	44.0
27. Palestino ..	400	160	40.0
28. Hispanujo ..	1200	410	34.2
29. Bulgarujo ..	1600	250	15.6
30. Ĉeĥoslovakujo	5300	405	7.6

* eraro en la lasta numero, korektita.

Por ĉiu membro kiu pagas kotizon al U.E.A. por 1949 estas donataj poentoj laŭ la jena tabelo :

Asocia membro ..	1
Membro kun jarlibro ..	5
Membro-abonanto ..	10
Membro-subtenanto ..	15
Patrono ..	50
Dumviva membro (nova) ..	50

Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro kompare kun la fiksita kvoto U.E.A. donos premion £10 (175 svisajn frankojn). Ĉiu delegito en la koncerna lando ricevos libropremion.

Voĉo de Islando N-ro 1, Jaro 1. Literatura revuo de Federacio de Islandaj Esperantistoj. Aperas kvarfoje en la jaro. Jarabono 5 ŝil. mendebla ĉe U.E.A.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Internacia ekspozicio de infanaj desegnoj

Grandajn sukcesojn atingis la ekspozicioj de la desegnoj, kies aŭtoroj estis knaboj de ses ĝis dek kvin jaroj el dudek ses landoj. En la pasinta oktobro S-ro Richard Levin en Lyon, Francujo, kiu diligente prizorgis la kolektadon, sendis ĝin al Milano kaj dum la sekvanta novembro okazis en la *Galerio Moderna Arto*, pretigita senpage de la Milana Urbestro, la ekspozicio de 670 desegnoj elektitaj el 3000 senditaj. Ĝi interesis, krom la urbanoj, ankaŭ la lokajn aŭtoritatojn kaj la kulturajn, pedagogiajn kaj artajn rondojn. Neniam infana ekspozicio estis vizitata de pli granda nombro da personoj. Partoprenis en ĝia malfermo la Asesoro por la instruado, S-ro Cattabeni, profesoro universitata, kaj la ĉefaj reprezentantoj de la urbaj lernejoj de ĉiuj gradoj. Nia lerta universitata profesoro G. Canuto, komitatano de U.E.A., paroladis pri la celoj kaj la utilo de Esperanto. Dum la ekspozicio okazis kvar kunvenoj :

- (a) la infana arto en la tutmondo (interparolantoj: la artistoj).
- (b) la grafikarto de la infanoj (interparolantoj : la pedagogoj).
- (c) ĉu la grafikarto de la infanoj devas esti libera kaj propravola, aŭ ĉu ĝi devas esti kondukata de la instruistoj? (interparolantoj : lernejestroj kaj instruistoj).
- (d) la unueco spirita de la infanoj, elpruvita per ilia grafikarto (interparolantoj : Esperantistoj kaj eminentuloj de internaciaj problemoj).

La kvara kunveno havis gravan rolon por ni ĉar ni pruvis, ke la infanoj de ĉiuj landoj estas kondukataj propravole kaj nature interfratiĝi, kaj nur per la tiel nomita *edukado nacia* ili forlasas nekonscie tiujn naturajn sentojn de interfrateco homa.

La ekspozicio transiris al Parma dum la monato decembro kaj poste al Venecio.

Ĉie ĝi sukcesis altiri la atenton de la lokaj aŭtoritatoj kaj la gazetaro. En ĉiu urbo la vizitantoj admiris simpatie la naturan arton de la lernantoj—de Brazilo ĝis Japanujo, de Madagaskaro ĝis Svedujo.

Utile estus se ĉi tiuj ekspozicioj povus ripetigi en ĉiuj landoj, ĉar tiel ni povus pruvi al la mondo la praktikan utilon de Esperanto. Tiel ni povus krei inter niaj junuloj, ankoraŭ spirite puraj kaj ne plenigitaj de danĝeraj kaj falsaj konceptoj naciaj, sentojn de frateco kaj de reciproka komprenado. Nur tiel ni povos atingi nian celadon: unu mondon unuigitan per unika lingvo.

E.P.

Enketo

Instruante en universitato fakon en kiu mi ofte devas elparoli formulojn, mi ofte scivolas, kiel mi povus elparoli ilin koncize sed tute klare en Esperanto. Por klarigi al mi ĉi tiun aferon, mi faras la sekvantan enketon. Ĉiu respondinto estos sciigata siatempe pri la rezultoj de la enketo. Aliaj gazetoj bonvolu represi !

1. Kiuj estas la nomoj de la literoj de via nacia lingvo, kaj kiel vi elparolas en via nacia lingvo la 26 literojn supersignajn de la latinida (okcident-eŭropa) alfabeto? (Skribu fonetike en Esperantaj literoj; ekz. franco respondu a-be-se kaj anglo skribu e-bi-si-)

2. Ĉu vi opinias, ke la Esperanta prononcmalmaniero (a-bo-co-ĉo) estas sufiĉe klara por elparolado de formuloj matematikaj, fizikaj kaj kemiaj?

3. Ĉu ĝi estas sufiĉe klara por la literumado de nekonataj nomoj aŭ de nomoj per la telefono?

4. Ĉu vi por tiaj celoj preferus havi alfabeton de "krom-nomoj", pli facile distingeblaj, por la literoj?

5. Por tia celo, kion vi opinias pri jena prononcado de Esperantaj literoj kaj de q, w, x, y, : a - bo - ce - ĉu - do - e - ef - ge - ĝi - haĉ - ho - i - jo - ĵe - ka - il - om - en - o - pe - qu (=ku) - ru - es - iŝ - tej - u - ŭeŭ - vi - we (ŭe) - ix (=iks) - ŭay (=ŭaj) - zet? Ĉu vi preferas alian prononcon de aliaj literoj, kiam klareco estas necesa?

6. Kian formon havas la kutimaj (grandaj kaj malgrandaj) *skrib*-literoj de la latinida alfabeto en via lando? (Bonvolu nete skribi ilin laŭ modeloj instruataj en vialandaj elementaj lernejoj).

7. Kiujn skribliterojn vi opinias ĝustaj por viaj manskribitaj leteroj en Esperanto? (Skribu denove alfabetojn grandliteran kaj malgrandliteran).

8. Ĉu en via lando *biliono* (*billion* aŭ simila vorto) signifas 1.000.000.000 aŭ 1.000.000.000.000. (kiom da nuloj?)

9. Ĉu en via lando 1.000,1 signifas *mil kaj unu dekonon* aŭ ĉu *unu kaj unu dekmilonon*?

10. Kio estas en via nacia lingvo la plej konciza (mallonga) legmaniero de la formuloj: $3-2=1$, $4 \times 3=12$, $5/2\frac{1}{2}=2$, $2^4=16$, kaj $\sqrt{9}=3$? Ankaŭ donu laŭvortan (t.e. laŭliteran, ne laŭsignifan) tradukon de tiu legmaniero. (Ekz. anglalingve: $5/2\frac{1}{2}=2$ 5 over $2\frac{1}{2}$ is 2 : 5 super $2\frac{1}{2}$ estas 2).

Bonvolu sendi viajn respondojn al: D-ro F. J. Belinfante, Dept. of Physics, Purdue University, W. LAFAYETTE, Indiana, Usono.

Georges Agricola :

BRITUJO, LA INSULO NEKONATA!

Ne atendu priskribon pri Britujo, kiun multaj el la legantoj pretendas koni kaj kiuj tamen malkonas la plej elementajn faktojn pri ĉi tiu *respublika monarkio*. Tre ofte oni ignoras tion, ke Brita ŝtatano ne devige estas anglo ; li povas esti skoto, ekzemple, kaj Edinburgo ja troviĝas en Grand-Britujo, sed ne en Anglujo ! Sennombraj estas la verkoj pri Britujo, multaj vojaĝas tien, nekalkuleblaj estas tiuj, kiuj lernas la anglan lingvon kaj iamaniere estas en regula kontakto kun britoj. La verkistino Augustine de Coulevain, en libro siatempe multe legita, elektis titolon *La Insulo Nekonata* por priskribi Britujon. Saman titolon elektis Paul Cohen-Portheim en libro aperinta en 1931 (England, die unbekante Insel) verko ankoraŭ nun leginda. Verkisto bone konata de la legantaro, Edmond Privat, en sia *L'ame anglaise* (La angla animo) kun la subtitolo *de piratoj al profetoj*, majstre pentris la loĝantojn de la nekonata insulo. Kio frapas fremdulon pleje en tiu-ĉi lando estas la apudeco de antikva kutimaro kun ekstrema moderneco. Oni povus ankaŭ nomi Britujon la lando de la kompromisoj. Efektive neniam okazis absoluta rompo kun la pasinteco en la longa historio brita. Ĉiam oni trovis interligon de nova situacio kun pasinta stato. Tiu-ĉi feliĉa miksaĵo estas ŝuldata al kelkaj karakterizaĵoj de vere brita pensmaniero : tiaj estas la *fair play* (honesto ludo), *common sense* (sana prudento), *self-government* (memregado) kaj *Commonwealth* (komuna bonstato), malnova vorto kun nova signifo trafa.

Same nekonata kiel Britujo estas Londono. Londono altiras kiel magneto kvankam ĝi ne posedas la grandiozajn bulvarojn de Parizo nek ĝiajn arkitekturajn valoraĵojn. Malgraŭ tio Londono posedas apartajn ĉarmojn, ĉar en Londono troviĝas Anglujo !

Aperis antaŭ nelonge interesege verko *The Londoner's England* (La Anglujo de la Londonano). Nuntempaj pentristoj, inter ili Kenneth Rowntree, John Piper, Ruskin Spear, Michael Rothenstein, kunigis vidaĵojn el flankaj stratoj, tipaj gastejoj malnovaj, tiom karakterizaj por Londono, kaj aliaj rimarkindaĵoj neatendataj.

La bildoj, iuj koloraj, estas akompanataj de teksto verkita de Alan Bott. Unu el la bildoj estas la Nelson-kolono vidata el la direkto de la senpretenda Warwick-strato, kie troviĝas gastejo el la jaro 1683. Alia folio montras la *Royal Drury Lane* Teatron. La unua teatro samloke (en kiu ludis la fama Nell Gwyn) brulis en la jaro 1672. La duan *Drury Lane* konstruis Sir Christopher Wren, la konstruinto de *Sankto Paŭlo*. *Covent*

Garden kelkcent paŝojn malproksimen ricevis la privilegion sub reĝino Anne. Ruskin Spear pentris *Ludgate Circus*. Je tiu-ĉi loko oni malkovris kaj elfosis dum la 17-a jarcento grandan saksan tombejon kaj keltajn antikvaĵojn. *Ludgate Hill* iam estis roko 15 metrojn alta. En la 14-a ĝis 18-a jarcentoj troviĝis tie la malliberejo, kiu gastigis la nepago-kapablajn debitorojn de la *Civito*. En sia grandioza plano por la rekonstruo de Londono post la granda brulo en 1666, Wren jam antaŭvidis, ke *Ludgate Hill* povus liberigi la perspektivon al la katedralo de *Sankto Paŭlo*. La avaro de la komercistoj en la *Civito* malebligis la realigon, kaj nur la bombardado aviadila de la dua mondmilito izoligis *Sanktan Paŭlon* kun ĝia granda kupolo.

Londono abundas je surprizoj. Kelkajn paŝojn de la eleganta parto de *Mayfair* (ĝi efektive iam estis foirejo) ni atingas *Shepherd Market*, kaj tie oni efektive povus kredi sin en kampara urbeto. Unu minuton de *Piccadilly Circus*—la *centro de la mondo*—troviĝas *Albany* nekonata eĉ de multaj Londonanoj. "Dum unu jarcento," skribis Alan Bott, "ĝi estis la plej fama nemonakeja kvartalo de fraŭloj !" Byron kaj Gladstone loĝis tie.


Londono verdire konsistas el multege da urbetoj kaj vilaĝoj. Loĝantoj de Hampstead parolas pri *nia vilago*. En *Londoner's England* estas reproduktita la *Well Walk* en Hampstead. Tie iam troviĝis saniga fonto, kaj inter la gastoj estis poeto Goldsmith, Samuel Johnson—verkisto kaj vortaristo—kaj David Garrick la fama aktoro. Aro da bildoj estas dediĉita al Chelsea. La domo kun numero 24 en Cheyne Row, en kiu loĝis Carlyle, ankoraŭ ekzistas. Inter la vizitintoj apartenis Mazzini, Emerson, Dickens, Thackeray ; kaj Chopin pianludis en ĉi tiu domo. Alan Bott krome rakontas, ke la fama porcelan-servico el mil pecoj, farita por la imperiestrino Katharina, estis pentrita en la fabrikejo Wedgwood en Chelsea.

Londono superas aliajn metropolojn pro io : per Tamizo en kiun penetras la marfluo, ĝi preskaŭ estas urbo ĉe la maro. Kiu iam staris fludirekte de *Tower Bridge* dum vespero, aŭ kiu vidis pretergliti la ŝipojn sur la *rivero ĉe Wapping* aŭ *Greenwich* aŭ eĉ nur de starpunkto en Billingsgate, tiu sentas ĝin.

La literaturo pri Londono formas bibliotekon ĉar la temo estas neelĉerpebla. Aŭtentika londonano, kiun oni demandis pri iu detalo de la urbo, respondis : Kiel mi sciu tion, mi ja loĝas tie ĉi nur sesdek jarojn ! Nu, multajn demandojn respondas tiu-ĉi libro kaj en alloga maniero.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***Enketo pri Internacia Help-lingvo** : de Pierre Bovet, Honora Direktoro de l'Instituto por Eduk-Sciencoj, kaj Henriette Ith, sekretariino.

Eld. Sveda Esperanto-Federacio laŭ peto de U.E.A. 32 p. broŝ., prezo 1.50 sv. kr. ĉe Eldona Societo Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19, Svedujo, aŭ 2ŝ. 6p. ĉe U.E.A.

Tre valora statistiko pri Esperanto-instruado prilaborita de la Rosseau-Instituto en Genevo. Ĉi tiu estas unu el la plej gravaj dokumentoj kiuj aperis post la milito kaj devus esti en la manoj de ĉiu pedagogo kaj ĉiu instruisto Esperantista. Ĝi donas rezultojn de testoj pri instruado, pri vortofteco kaj pri progreso de lernantoj diversaĝaj kaj diversgradaj. La notoj pri vortofteco donas gravajn kaj atentindajn indikojn ankaŭ pri la sama temo ĉe nacilingva instruado, kaj povus formi bonan bazon por plua studado sur la sama tereno.

En la konkludoj la noto ke "Ne sufiĉas nur diri al infanoj, ke la homoj, kiuj konstruis la lingvon kiun ili devas lerni, havis bonajn intencojn. La infanoj devas trovi spiritan nutraĵon en la lingvo mem, en la vivo de ĝia kreinto, en la literaturo ekzistanta, precipe en la literaturo de la unuaj tempoj de la ekzisto de la helpilingvo, kiu vive respegulas la celon, la kuraĝon, la daŭremon, eĉ obstinecon, de la tiamaj pioniroj, kiuj devis *sufери* por sia idealo.

Tiaj ekzemploj estas necesaj por infanoj, por igi ilin elkore deziri iĝi mem valoraj membroj de la homa komunumo" donos motivon por vigla diskutado ĉe pedagogoj ĉe kiuj troviĝas forta divido de opinio tiurilate; sed la opinio de tia aŭtoritato devas esti konsiderata.

Bela prestekniko kaj bona papero.

M.S.

***Preĝareto** : P. M. Prof. Carolfi, O.M. Tria eldono, ampleksigita. Eld. A. Paolet, Italujo. 12×8 cm. Broŝ. 70 p. prezo 1 ŝil.

Jen tria (pliampleksigita) eldono de ĉi tiu preĝareto por katolikoj. Laŭ la antaŭparolo ĝi estas eldonita por gejunuloj, tamen ĝi estas rekomendinda ankaŭ por maturaĝuloj. Krom petoj pri specialaj gracoj, ĝi enhavas preĝojn kaj meditojn por diversaj okazoj—antaŭ la sakramentoj, mateno kaj vespero, k.t.p. Al mi ŝajnas, ke ĝi estus utila por la horoj de meditado kaj privata preĝado. Fakte la apero de tria eldono pruvas, ke ĝi jam trovis akcepton ĉe katolikoj. La stilo estas simpla, la ekstera aspekto plaĉa, kaj la preso kaj papero bonaj.

La lingvo estas meze bona. Kelkloke oni trovas objektan particepsiteton kaze neakorda, kaj adjektivan particepsiton anstataŭ adverba. En la ofte uzitaj esprimoj *kredas en*, *fidas en*, kaj *esperas en*, la prepozicio devus esti *al*. *Eksprese mi kredas* (p. 10) anst. *firme mi kredas*; *planigas* (p. 47) anst. *planas* kaj *centjaroj* (p. 54) anst. *jarcentoj* (aliloke uzita) estas kelkaj el la notindaj eraroj. Ĝenas la ofta uzo de la artikolo kun apostrofo, kaj la formo *Jezuo* anstataŭ la preferinda *Jesuo*. Troviĝas aliaj gramatikaj malglataĵoj, kaj preseraroj ne mankas. Estas bedaŭrinde, ke tiom da eraroj makulas verketon, kies ĝisnuna sukceso certigas daŭran vivon. En tia verko oni devus celi lingvon kiel eble plej perfektan.

John S. Dinwoodie.

***La Suda Stelo** : oficiala organo de Jugoslavia Esperanto-Federacio. Abonebla ĉe U.E.A. 6 ŝil. jare.

Ni volas atentigi niajn legantojn pri ĉi tiu neordinare bona enlanda gazeto, kiu prezentas objekte kaj en bona flua stilo faktojn pri organizo, enlandan kronikon, ĝeneralaĵojn kaj paĝon el *Literaturo, Arto, Scienco*. La granda plimulto estas en Esperanto kaj oni povas gratuli la redaktan komitaton (Lapenna, Vanĉik, Boroveĉki) pro bone elektita kaj interesa materialo.

M.S.

Fascicule No. 7. Daŭrigo de la altvalora serio de *Feuillets Encyclopédiques de Documentation Espérantiste*, de Louis Perret, 106 cours Dr. Long, LYON, Francujo.

Tekstaro de la Filmstrio N-ro 159/18. Indianoj kaj Eskimoj de Norda Ameriko. Tre interesaj informoj pri la indiĝenaj popoloj de la norda duono de la "nova" mondo. Prezo, komplete kun filmstrio: 14ŝ. 8p. Mendebla ĉe Esperanto Film-Grupo, BERGEN-OP-ZOOM, Nederlando; pagebla ĉe U.E.A.

Esplora Rondo por la Parolspuro : Ciklostila informilo, akirebla ĉe Kaiserstrasse 19, (22a) Wuppertal-V, Germanujo.

GRAVA ATENTIGO : La recenzoj en *Esperanto*, kiel en ĉiu bona gazeto, ĉiam reflektas la privatan opinion de la recenzinto, sed neniel povas esti konsiderataj kiel oficiala sinteno de la Asocio. En la pasinteco konsideroj pri spaco ofte devigis la forigon de subskribo de tiaj komentarioj kaj mencioj, sed en tiuj okazoj la subskribo ĉiam estis de Mason Stuttard, kiu akceptas plenan respondecon pri la opinioj tie esprimitaj. (Redakcio).

Nia Felietono :

KAPTITOJ SUR LA GLACIROKOJ

F. Omelka

V. Sur la glaciroko (*daŭrigo*)

Marcel Payen kaj la radiisto, armitaj per ŝtalaj stangoj, fine eliris por rigardi la ĉirkaŭaĵon.

“S-ro Bernier, ĉu mi rajtas rigardi viajn mezuraparatojn?” vokis Generalo Gibson al la foriranta radiisto.

“Kompreneble, sinjoro Generalo.”

Payen kaj Bernier supreniris sur neabrupta deklivo. Ili konstatis, ke la vojo estis libera ĝis tiu loko, kie eksuprenleviĝis la kruta, nuda kaj neatingebla pinto.

Tie ili haltis. Ili ĉirkaŭrigardis. Klifoj, glacirokoj, neĝo. Ili malsupreniris al la aeroplano.

“Ĉu vi vidis ion?” bonvenigis ilin la ceteraj.

“Nenion,” diris Bernier.

“Ni nun rigardu malsupren. Eble tie . . . ” diris Payen.

Kiam ili iris sur la deklivo malsupren, ilia perspektivo estis malebligita per la alta neĝblovaĵo. Preteririnte ĝin, ili ekkriis de mirego. Ili staris sur la rando de kruta rokmuro, kiu falis vertikale en la profundon de minimume dek kvin metroj. Malsupre ĝi ŝanĝiĝis en novan neabruptan deklivon, kiu subite kondukis maldekstren malantaŭ ankoraŭ unu rokmuron.

Kio troviĝis malantaŭ ĝi?

Certe ankoraŭ novaj krutaĵoj, deklivoj, ĝis tie en la malproksimo estas malsuprenira vojo en la valon . . .

Ambaŭ viroj senparole rigardis sin.

Malantaŭ ili staris krutaj klifoj; antaŭ ili vertikala rokmuro. Estis certe, ke per propraj fortoj ili neniam foriros de sur la glaciroko.

La pasaĝeroj akceptis la raporton de la du viroj kvazaŭ tute trankvile. Neniu malkaŝis, kiom malgrandiĝis la flameto de espero en la koro. Sian tutan restantan fidon ili direktis al la blua firmamento. Nur de tie povas veni la savo.

Ili decidis, ke sanaj viroj alternos tage kaj vespere en patrolado. Se ili ekvidos tage aviadilon, ili elpafos kolorajn raketojn. En la mallumo ili bruligos benzinon, kiun ili tiucele lokis je sekura distanco de la aviadilo.

La tria tago pasis en febra streĉo. Ankoraŭ nenio. La ĉielo estis pura kaj silenta. La vento jam tute ĉesis. Ĉio estis bela, sed malĝojiga. Kiam vesperiĝis, la radiisto Bernier, kiu ĵus

deĵoris, komunikis, ke al li ŝajnis, ke li aŭdis bruon de motoro. Kiu povis, kuris eksteren. Vere! Ili vidis nenion, sed tute klare distingis la regulan muĝadon de la motoroj.

Bernier pafis ruĝan raketon. Poste la duan, trian, kvaran, kvinan . . .

La muĝado malplifortiĝis, ĝis ĝi tute silentis.

La perditoj, palaj pro ekscitiĝo, preskaŭ ne spiris. Nur post momento Bakker diris:

“Domage. Ĝi certe estis aeroplano serĉante nin.”

“Mi ne samopinias,” diris Generalo Gibson.

“Kial, sinjoro Generalo?”

“Ĉar . . . ” la generalo eksilentis. Nur poste li daŭrigis: “Mi ne intencis diri tion al vi. Sed cetere estas pli bone koni la realon, eĉ se ĝi estas kruda.”

Ĉiuj streĉe rigardis lin.

“Mi konstatis, ke la kunpuŝiĝo difektis ankaŭ la aparatojn por mezuri geografian pozicion. Tio, kion elsendis S-ro Bernier, ege diferencas de la realo. Pro tio, oni ne serĉas nin ĉi tie.”

“Kaj kie do ni troviĝas?”

“Minimume cent kilometrojn nordoriente de la loko, kiun ni komunikis al la Berna stacio!”

VI. La serĉo

La viro, deĵoranta en la Berna radiostacio sur la flugejo, havis multe da laboro, kiel ĉiam. Komunikoj el ĉiuj direktoj kruciĝis rapidege. Subite li aŭdis la vokon MAYDAY. Ĉiuj sendstacioj eksilentis antaŭ la grava komunikado.

“MAYDAY el aviadilo F-AKCS . . . !”

La radiisto rapide notis la raporton de Bernier. Poste dua komunikado, pri la nutraĵoj. Kaj aldono: “Sendu al redakcio . . . ”

Fino.

“Daŭrigu!” vokis la radiisto. “Ni aŭdis bone, daŭrigu!”

Nenio aŭdiĝis.

“Flugejo en Berno!” Li ne volis cedi. “Elsendu konstante, ni atentigos ĉiujn staciojn!”

Li vokis vane. Li jam sciis, ke oni ne aŭdas lin, sed li tamen ne ĉesis. Nur kiam li estis certa, ke la kontakto estis tute rompita, li komunikis la sciigon al ĉiuj svisaj radiostacioj. Post horo sciis pri la frakasigo ankaŭ cirkaŭaj landoj: Francujo, Italujo, Aŭstrujo, Germanujo. La komunikado

rapide disvastiĝis okcidenten kaj orienten, norden kaj suden, kaj vespere la deksepan de Novembro raportis preskaŭ ĉiuj eŭropaj sendstacioj :

“En la Alpoj frakasiĝis aeroplano de tipo Amiot F-AKCS dum flugo de Romo al Parizo. El la tuta nombro de dek du personoj, estas ok vunditaj. Pri savaj laboroj oni ankoraŭ ne povas komenci ĉar en la Alpoj furiozas neĝventegoj.”

La savajn laborojn oni ankoraŭ ne entreprenis, sed ili estis jam preparitaj. En Svisujo, Italujo, Francujo kaj Anglujo interkonsiliĝis pilotoj. Kaj ne nur pilotoj. Ankaŭ aviadsekcioj de la kuniĝintaj staboj konstruis planojn por savi la perditojn. En oficejo tio aspektis kiel antaŭ la komenco de ofensivo. Militaj fakanoj estis klinitaj super detalaj landkartoj de la Alpa montar-masivo ; ili mezuris distancojn, notis altojn de la montoj kaj klopodis diveni, sur kiu glaciroko la tragedio povis okazi.

Al ĉiuj estis klare, ke la helpo devos veni plej eble rapide se la viktimoj de la katastrofo ne devos pereji de frosto, malsato kaj manko de kuraciloj.

Ĵurnaloj en okulfrapa aranĝo alportis la sciigon pri la malfeliĉo. Denove oni pridebatis la demandon, kiom danĝera estas vojaĝado en aeroplano. Al iuj skribistaĉoj, kiuj dum la tuta vivo eĉ ne proksimiĝis al aeroplano ĉar ili sentis preskaŭ prahistorian teruron pri la bluetaj altoj, la alpa tragedio estis *akvo por ilia muelilo*. Ili memorigis ĉiujn grandajn katastrofojn, kiuj okazis en la historio de la aviado. Ili klopodis pruvi, ke la vojaĝado per la vagonaro estas multe pli sekura, kaj avertis kontraŭ uzado de la aeroplano.

Sed kontraŭ ili elsvarmis la armeo de la bravaj agloj. Ili estis tiuj, kiuj sentis sin kiel hejme en la aero, amikoj kaj sindonaj adorantoj de la aera sporto. Trankvile, sen vana kriado, ili arigis senfinajn vicojn de ciferoj, kiuj mem parolis. Ili citis per nefanfara parolo la faktojn. Objektivaj legantoj konkludis, ke la nombro de viktimoj rilate al la nombro de faritaj flugoj estas neniel malpli bona ol ĉe aliaj transportiloj.

Estu kiel ajn, ĉi tiu polemiko vekis tiom grandan intereson pri la viktimoj en la Alpoj, ke el ĉiuj mondpartoj venis proponoj, kiel savi ilin. Ĉar ĉiuj artikoloj—egale, ĉu la skribintoj estis por la aviado aŭ kontraŭ ĝi—finiĝis per tiu sama konkludo : Sur la glaciroko en la Alpoj pereas dek du malfeliĉuloj. Savu ili !

Ĝi sonis el ĉiuj landoj kiel petego kaj samtempe kiel severa ordono. Ĝi estis ankaŭ pruvo, ke la homaro ne lasis sin finbatiĝi de la kelkjara regado de mallumo. Ke homo restis homo malgraŭ ĉiuj teruraj scenoj en koncentroj, ke homo ne ĉesis ami la homon kaj ne perdis intereson pri la vivo

de sia proksimulo malgraŭ sciigoj pri hekatomboj de mortintoj en gaskameroj, sur batalkampoj, en bombarditaj urboj, sur ekzekutejoj. Ĝi sonis kiel kanto, per kiu la homaro volis sonigi ĉiun sian ardan kredon, ke en la mondo estas ne nur kolero kaj malamo, sed ankaŭ la amo.

Ekheliĝis la dua tago kaj Svislando elsendis la saman komunikon :

“La neĝventego furiozas egalforte. Alpoj kaŝitaj de nebulo, la flugado neebla.”

Des pli fervore oni daŭrigis la preparojn por savaj laboroj. Ĉu estos eble alteriĝi al la glaciroko ? Kaj se ne, kiamaniere oni savos ilin ? Oni malsuprenĵetu al ili nutraĵojn. Bone, sed kio poste ?

Kaj jen oni sendis jenan proponon. Alveturigu el Anglujo la usonajn helikopterojn, tiujn aviadilojn de admirinda konstruo, kiuj povas alteriĝi kaj suprenleviĝi en kiu ajn loko, vertikale malsupren kaj vertikale supren, sen kiu ajn veturiga surfaco. Per tio oni savu perditojn, eĉ se ili estu tuj sub krutega montfaco !

Samtempe sin anoncis grandega legio de volontuloj el la vicoj de la svisaj montgrimpuloj, kunigitaj en *Savsindikato de la svisaj alpistoj*. Tiuj ĉi viroj ne inklinis multe paroli. Ĉiu esploris sian ekipon—ŝnuregon, montgrimpajn botojn, stangojn, krampojn, hakileton, dorsosakon—kaj rigardis la ĉielon. Kaj la vizaĝo malheliĝis, kiam li vidis la montegojn nebulitaj kaj poste reiris en la kabanon. Ili kuŝigis sin sur lignan liton tiaj, kiaj ili estis : vestitaj, kun botoj pretaj por en kiu ajn momento eliri al la frostaj pintoj. Dekoj da tiaj savgrupoj atendis en turistaj kabanoj en la Alpoj la komandon.

Fine heliĝis.

La Alpoj ektondris per muĝado de motoroj. Aviadiloj de la plej diversaj tipoj, aviadiloj svisaj, francaj, anglaj, usonaj kaj italaj flugis super la suda parto de la Alpoj kaj serĉis la perditojn. Ne ekzistis unu granda glaciroko en larĝa cirklo ĉirkaŭ la montoj Collon kaj Combin, kiu ne estis zorgeme esplorita. Ĉar la aviadistoj ĝuste supozis, ke la aeroplano estos superŝutita de neĝo kaj pro tio malmulte videbla, ili flugis en danĝera proksimo de la tero por ke ili nenion malatentu. Sed ĉiuj grupoj de la savaj aeroplanoj refluĝis al siaj flugejoj kaj la pilotoj raportis per la mallonga parolo de aviadistoj :

Nenion !

Kaj simile fartis ankaŭ la svisaj montgrimpuloj, kiuj faris verajn miraklojn de bravo. Ili malatentis tion, ke la freŝe falinta neĝo komencis rulfali en la abismojn en la formo de lavango, kiu povus ilin en ĉiu momento superŝuti. Ili silentis dum danĝera suprengrimpado, ili ne parolis dum

malsuprenirado. Nur post reveno en la kabanon ili raportis al sia centro :

Ankoraŭ nenion !

Io sufoka penetris en la kabanojn en kiuj sidis la pilotoj kaj observistoj. Ĝi penetris en la oficejojn, kie oni organizis novajn kaj ankoraŭ novajn flugojn. Ĝi ŝvebis interne de la muroj de la turistaj kabanoj. La perditoj komunikis, ke ili havas nutraĵojn por du tagoj. De ilia elsendo jam pasis la tria tago.

Kiom longe ankoraŭ . . . ?

En ĉi tiun malbonan humoron ĵetis kelkajn sunradiojn la komuniko de la franca parto. Montanoj en alte situanta vilaĝo asertis, ke ili en tiu fatala tago aŭdis tre klare la krakon, kiu povis deveni nur de aviadil-frakasiĝo.

Oni alidirektis la ĉefan ondon de la serĉado okcidenten. Nu, kial ne ? La radiotelegrafisto el Amiot F-AKCS sciigis, ke li fiksas la geografian pozicion nur proksimume.

Sed la dudeka de Novembro proksimiĝis al la fino kaj raportoj de ĉiuj ekspedicioj sonis konsente :

Ĉiam ankoraŭ nenion !

Tiun saman vesperon vibris telefondratoj en ĉiuj turistaj kabanoj laŭ la tuta longo kaj larĝo de la Alpoj. La *Savsindikato de la svisaj alpistoj* eldonis ĉi tiun ordonon :

“Al ĉiuj savgrupoj ! Disvastigu la serĉon tra la tuta Alpregiono ! Uzu ĉiujn rezerveojn !”

Tio estis la lasta, kiun povis ĉi tiu nobla asocio fari por savi la perditojn. (*daŭrigota*).

Esperanta elsendo de opero

La elsendo de la opero *En puto* de Vilém Blodek en traduko de D-roj Tomás Pumpr kaj J. Fousek, London la 2-an de Majo meritas apartan mencion. Tio memorigas pri la antaŭaj elsendoj—operoj kaj muzikaĵoj de Smetana, teatraĵoj de K. Čapek—kiujn faris la sama radio-instanco.

En suda Anglujo la elsendo bone atingis nin kaj estis vera ĝuo aŭskulti la gajan muzikon de ĉi tiu ĉarma opero. La kantado de la ĉefroluloj estis admirinda kaj ilin bonege subtenis la 72-membra kanthoro de la Ĉeĥoslovaka Radio.

Estas dezirinde, ke la samideanoj laborantaj por tiel belaj rezultoj ricevu almenaŭ decan rekompencan de la internacia samideanaro en la formo de gratulaj leteroj kaj poŝtkartoj. Tiujn komunikojn direktu al: Radiostacio Praha, Verda Stacio, Stalinova 12, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo. (Notu ŝanĝon pri la elsendoj de la Verda Stacio en Radio-kalendaro).

M.S.

Ekspozicio de infanaj artverkoj en Aŭstralio

Por doni konvinkan pruvon pri la valoro de Esperanto ĉe la infanoj, la grupo en Sydney, Aŭstralio, intencas aranĝi imponan ekspozicion de infanaj artverkoj. La direktoro de edukado ne estas konvinkita pri la efektiva valoro de Esperanto kaj tio estos unu rimedo altiri lian atenton al nia afero. La ekspozicio, cetere sukcesigebla nur per kunlaboro kaj kunhelpo de la tutmondaj gesamideanoj, verŝajne okazos en la Nacia Art-Galerio, la plej grava pinakoteko en la lando, kaj poste la artaĵoj estos dissendataj al diversaj lernejoj.

La ekspozicion oni dividos en tri fakojn : (1) por infanoj ĝis 8-jaraj ; (2) 8-12-jaraj ; (3) 12-16-jaraj. Oni ne donos premiojn, sed ĉiu sendinto ricevos interesajn el Aŭstralio. La desegnaĵoj prefere montru scenojn el la koncerna lando, popol-kutimojn, kostumojn, birdojn, bestojn kaj florojn enlandajn.

Precipe geinstruistoj, sed ankaŭ ĉiuj gesamideanoj, helpu en ĉi tiu grava laboro. Ĉion sendu, por ke ĝi atingu Aŭstralion antaŭ la fino de Aŭgusto, al : La Sekretario, Ekspozicia Komitato, Sydney Esperanto Society, 12 Ennis Road, MILSON'S POINT, N.S.W., Aŭstralio.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Marmenout-Van Steene. Je 28a de Aprilo naskiĝis al Ges-oj A. Marmenout-Van Steene en Blankenberge, Belgujo, filineto Francine.

Støp-Bowitz. Je 22a de Novembro 1948 naskiĝis al Ges-oj Støp-Bowitz en Oslo, Norvegujo, tria filo, kiu ricevis la nomon Harald.

Withoos. Je la 10a de Marto 1949 naskiĝis al U.E.A.-delegito en Eindhoven, Nederlando, filineto, kiu ricevis nomojn Dorothea Gerarda Maria.

Distingo

Eschenbrenner, S-ro Louis, en Sablé (Sarthe) Francujo, multjara Esperantisto kaj ano de U.E.A., estas nomita Kavaliro de la Honora Legio. Tre koran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni sciigas pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ne esprimas nian profundan kondolencon.

Martin, Auguste, en Macon, Francujo mortis 27an de Aprilo. Aliĝinte antaŭ 45 jaroj al la movado en ties heroeca epoko kaj jam en 1909 al U.E.A., li servis dum 40 jaroj kiel delegito. Pro lia senŝanceliĝa fideleco la Asocio nomis lin Honora Membro okaze de la 25-jara jubileo de U.E.A.

Pravenac, Ladislav, kunfondinto de la Esperantista Klubo en Praha, multjara membro de U.E.A. mortis 1-an de Novembro 1948.

Stewart, S-ro George, mortis en Largs, Skotlando 17an de Aprilo. Multjara delegito de U.E.A.

UNIVERSALA ĜSĜERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 217

5-an de Majo 1949

KOMITATO

Pro eraro, kiun ni tre bedaŭras, la nomoj de la jenaj komitatanoj ne aperas sur paĝoj 7-8 de la nova jarlibro. Bonvolu aldoni ilin.

E. Bugajski, Zabkowska 38 m. 14, Warszawa, Polujo.
I. Dratwer, 11 Listopada 22, T.O.Z., Warszawa, Polujo.
D-ro T. Van Gindertaelen, Leopoldstr. 99, Mechelen, Belgujo.
F-ino N. Gropuzzo, Harambasićeva 19, Zagreb, Jugoslavujo.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstrujo

Kitzbühel. D : F-ino M. L. Planck, Hinterstadt 32/II.
FD (Katolikaj aferoj) : La D.
Wörschach. D : D-ro Ludwig Kaspar, Wörschach, Stirio.

Brazilo

Pôrto Alegre. VD : A. Flores, Rua Guilherme Alves 1617.
Tel : 3-19-95.
FD (Kuracado) : D-ro J. Corrêa de Barros, Escola Preparatoria. Tel : 32902.

Britujo

London. VD : N.W.1 : S-ino H. Stevens, 25 Chalcot Square, N.W.1. Tel : PRImrose 6200.

Ĉeĥoslovakujo

Praha. FD (Ekonomio) : D-ro M. Weirich, Ke Koulce 3, Praha XVI.
Uherské Hradiště. D : F-ino R. Vilémová, Sanita.

Danlando

Kolding. FD (Ĝardenkulturo) : H. Hansen, gl. Kongevej 19.

Francujo

Dijon. D : P. Cugny, 14 Rue Auguste Brullé.
Romans (Drôme). FD (Fotografio) : R. Mazade, 27 Rue Armillerie.
St. Pourcain sur Sioule (Allier). D : L. Courtinat, 9 rue Séguier. Tel : 198.

Germanujo

Berlin. FD (Turismo) : W. Gieseler-Fischer, Forstweg 79, Berlin-Frohnau.
Braunschweig. D : F-ino K. Jahns, Zeppelinstr. 7.
Gelsenkirchen. D : H. Böcker, Westerholterstr. 85, (21a) Gelsenkirchen-Buer I. Tel : 302 41.

Hispanujo

Valencia. FD (Kuracado) : D-ro F. Poveda, Ribera 14. Tel : 17694.

Islando

Hornafjörður. D : Hallgrímur Saemundsson, Höfn.

Italujo

Varese. FD (Naturscienco) : M. Simondetti, via Staurenghi 24. Tel : 35.80.

Nederlando

Deventer. FD (Profesi-konsilado) : F-ino L. Adelaar, Brinkgreverweg 5. Tel : 3198.

Pollando

Radom. FD (Kooperativismo) : T. Rogalinski, ul. Sienkiewicza 9 m. 18.
Wrocław. VD : T. Jarzebowski, skr. poczt., Wrocław 12.

Svedlando

Motala. VD : S. Öhrner, Terassgat. 8. Tel : 3021.
Skellefteå. D : A. Bränström, Box 69. Tel : 10466.
Tranås. D : Y. Svensson, Reso Resebyrå, Storgatan 11. Tel : 4660.

ŜANĜOJ

Britujo

Bathgate. D : nova adreso : Boghead House.
Largs. D : vakas.

Egiptujo

Giza. D kaj FD : nova adreso : P.K. 350, Cairo.

Finnlando

Pori. VD kaj FD : nova adreso : Poste Restante.

Francujo

Macon. D : vakas.
Malo-les-Bains. FD (Hoteloj) : nova adreso : Boite Postale 5.

Hungarujo

Pécs. VD : vakas.

Kanado

Victoria (B.C.). D : nova adreso : Box 3276A, Latoria Road, R.R.1.

Maroko

Casablanca. FD (sporto) : nova adreso : 23 Rue de Dijon.
Meknés. FD (Instruado) : nova adreso : 23 rue de l'Oujda.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Galvanizado) : vakas.

Svedlando

Sandared. D : vakas.
Stockholm. FD (Reklamado) : nova adreso : Sareksv. 5, Bromma.

Usono

Fallbrook (Calif.). D : vakas.

DUMVIVA MEMBRO

S-ro Anders Roos, Norrköping, Svedujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949.

299. D-ro L. de A. Coutinho, Belo Horizonte, Brazilo.
300. S-ro A. W. de Freitas, Rio de Janeiro, Brazilo.
301. S-ro M. J. Gaio, Rio de Janeiro, Brazilo.
302. D-ro B. Portela, Pedra Azul, Brazilo.
303. F-ino I. M. Cochrane, Dunfermline, Skotlando.
304. S-ro H. Dodson, Willaston, Anglujo.
305. S-ro E. B. Foreman, Nottingham, Anglujo.
306. S-ro J. H. Shaw, Swanwick, Anglujo.
307. S-ino M. Zaks, Pieszyce, Pollando.
308. S-ro M. Sygnarski, Kraków, Pollando.
309. S-ro B. S. Ohana, Marrakech, Maroko.
310. S-ro A. Martin. Macon, Francujo.
311. S-ro Mr. P. van Delden, Deventer, Nederlando.
312. S-ro W. M. P. J. Holzhaus, Amsterdam, Nederlando.
313. S-ino E. A. Jacobi, Johannesburg, Sud-Afriko.

- 314. S-ro G. Debrouwere, Kortrijk, Belgujo.
- 315. S-ro K. Takács, Heimschuh, Aŭstrujo.
- 316. Prof. L. Apcher, Meknés, Maroko.
- 317. S-ro C. Pot, Slikkerveer, Nederlando.
- 318. S-ro A. Bloemendal, Deventer, Nederlando.
- 319. D-ro O. Damsté, Amsterdam, Nederlando.
- 320. Pastro J. Garbala, Gdansk, Pollando.
- 321. D-ro W. A. Gibson, Bathgate, Skotlando.
- 322. S-ro W. Morris, Birmingham, Anglujo.
- 323. S-ro B. E. Parker, Beckenham, Anglujo.
- 324. D-ro F. E. Ballard, Reseda, Calif., Usono.

DONACOJ. D-ro F. E. Ballard 15ŝ., A. Beltrami 3ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	5264	4049
Individuaj membroj :		
MJ	702	605
MA	3902	3592
MS	306	324
Patronoj ..	21	15
DM	163	179
HM	55	57
	5149	4772
	10413	8821

Jarlibro. La unua parto de la jarlibro eliris en la unua semajno de Majo. Se iu membro ne ricevis ĝin, li bonvolu informi la centran oficejon por ke oni esploru la aferon.

Kongreso 1950. Laŭ decido de la Estraro la 35a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Parizo, Francujo.

Atentu! Dum la kongresa periodo la oficejoj en Rickmansworth kaj Genevo estos fermitaj. Oni bonvolu klopodi, ke korespondaĵoj ne atingu la oficejojn dum tiu periodo. Antaŭdankon.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Unika internacia kurso en Svedlando

Plue al la informoj donitaj en nia Maja numero, aliĝis al la kurso aranĝita de Sveda Esperanto-Instituto kunlabore kun la sindikata kaj kooperativa movadoj, personoj el Britujo, Bulgarujo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Svedlando, Turkujo kaj Usono. Sed restas ankoraŭ pluraj lokoj en la kurso.

Oni admonas la diverslandajn samideanojn profiti ĉi tiun unikan okazon. Bonvolu informi, ĉu vi estas preta mem pagi la kurskoston, 90.- kr., aŭ ĉu via partopreno estos dependa de stipendio. Bonvolu indiki, kiun profesion vi havas, ĉar la stipendiojn ni devas ricevi de la koncernaj svedaj fakasocioj.

La kurso okazos 26 Junion—10 Julion en Viskadalen apud Gotenburgo. La temoj estos: Konstitucia sistemo, kooperativaj organizaĵoj, pensioj, asekurado, kulturaj memoraĵoj, k.t.p. Petu informojn de Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm, Svedlando.

34-a Universala Kongreso de Esperanto

Bournemouth, Anglujo

6-13 Aŭgusto, 1949

Adreso por leteroj : 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Kongresejo : La Urbdomo, Bournemouth.

Kongreskotizoj :

Kongresano	ŝil. 40
Edzo aŭ edzino de kongresano ..	ŝil. 20
Junul(in)o ne pli ol 20-jara ..	ŝil. 20

Notu, ke ne **ne akceptos** kongresaliĝojn post la 1a de Julio.

Kongreskarto : Tuj post ricevo de la aliĝo kaj kotizo, L.K.K. sendos al vi provizoran kongreskarton kun informoj kaj mendilo por loĝejoj kaj ekskursoj. Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkuponon (Britoj, poŝtmarkon).

Aliĝoj ĝis la 7a de Majo :

Argentino ..	2	Irlando ..	10
Aŭstralio ..	2	Islando ..	1
Aŭstrujo ..	8	Italujo ..	19
Belgujo ..	24	Jugoslavujo ..	3
Brazilo ..	2	Kanado ..	3
Britujo ..	750	Nederlando ..	48
Bulgarujo ..	2	Norvegujo ..	41
Ĉeĥoslovakujo ..	7	Nov-Zelando ..	2
Danujo ..	48	Polujo ..	5
Finnlando ..	12	Portugalujo ..	1
Francujo ..	156	Svedujo ..	131
Germanujo ..	10	Svislando ..	23
Hispanujo ..	2	Usono ..	8
Hungarujo ..	7		
Irano.. ..	1	28 landoj ..	1328

Loĝejoj. Se vi ankoraŭ ne mendis vian loĝejon bonvolu tion fari senprokraste. Notu, ke estas nun grava manko de unu-personaj ĉambroj sed ke ni ankoraŭ havas disponeblaj multe da ĉambroj por du, tri aŭ kvar personoj, precipe kun duoblaj litoj. Vi faciligos nian laboron se vi uzos la loĝmendilon.

Grava averto. Notu, ke estos senutile veni al Bournemouth sen antaŭe rezervita loĝejo. La banurbo estas ĉiam plenplena en Aŭgusto, kaj se vi alvenos tie sen loĝejo jam aranĝita, preskaŭ certe vi devos reiri hejmen la saman tagon.

Kongreslibro. La programo estas nun preskaŭ preta, kaj ni esperas dissendi la kongreslibron kaj lastajn instrukciojn en Junio.

Somera Lernejo de Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj, 13-20 de Aŭgusto. Nun disponas kelkajn lokojn por ne-instruistoj. Detaloj de F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30.

NE PLU ESTAS LOKO EN
LA INTERNACIAJ FERIAJ
KURSOJ EN HELSINGØR,
DANLANDO, 17-25 JULIO

Sub aŭspicio de UEA.

Petu prospekton de S-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Esperantista ferio en Norvegujo

De la 15a ĝis la 22a de aŭgusto vi havos
okazon pasigi libertempon en Lofthus,
Hardanger, la plej bela regiono de okcidenta
Norvegujo.

Pasintan someron 52 samideanoj el 9 landoj
ĝuis neforgeseblajn tagojn tie. Venu vi ĉi
tiun someron !

La restado kostas 125 n.kr. kaj la ekskursoj
25 n.kr. Ju pli frue vi anoncos vin, des pli
certe vi havos lokon. Jen la adreso :

**Esperantista ferio, poŝtkesto 132,
Haugesund, Norvegujo**

LERNU ESPERANTON

de
DANIEL QUARELLO

Libro-serio por niaj verkistoj,
tradukistoj kaj literaturamantoj.

I. Lerne Esperanton
II. Komplementoj de l' Substantivo

Prezo, afrankita po 1ŝ. 4p. por ĉiu libreto.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

BONVENON al FRANCUJO

La asocio de Esperantistaj Instruistoj (G.E.E.)
invitas vin al feriaj Esperantokursoj :

en sudokcidenta urbo ANGOULEME,
17-30 julio ;

en apudmara nordokcidenta GRANVILLE,
25 aŭg.-15 sept.

Por pli da detaloj sendu respondkuponon al :

F-ino Jeanne Dedieu
3 rue Arzac, Toulouse, Francujo

LETEROJ de L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la
francaj eminentuloj. Prezento kaj komento de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906.

388 paĝoj, 21×14.5 cm., bindita.

Prezo 15 ŝil., afranko 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam konigas detalojn de vivo,
karaktero kaj sentimento de la skribinto tiel ke personaj leteroj kompletigas
biografiojn. En tiu ĉi libro ne temas nur pri leteroj de la majstro, sed
ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj gvidantoj de nia ideo en la frua
epoko de la movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon kaj detruos
aron da legendoj.




Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

FLUGU PER **BEA**



al la **Universal a Kongreso de Esperanto**

Ĉu vi venos Britujon? La plej bona rimedo estas BEA, kiu funkciigas efikan, akuratan servon el ĉiuj partoj de Eŭropo. En komfortaj Viking-aj aviadiloj, kun unuaranga kuirservo, minimumo da formalaĵoj, kun tradicia ĝentileco, BEA proponas al vi aervojaĝadon modelan,—kaj dum vi estas en Britujo memoru, ke BEA povas porti vin ankaŭ al la ĉefaj centroj de Kimrujo, Skotlando kaj N. Irlando, Ŝanel-Insuloj kaj Insulo Man. Rezervoj ĉe : BEA-oficejoj aŭ la ĉefaj vojaĝ-agentoj.

BEA certigas vian alvenon, kaj tien kaj reen

B R I T I S H E U R O P E A N A I R W A Y S

Printed by SUMFIELD & DAY, LTD., Station Street, Eastbourne, for the Publishers, Universala Esperanto-Asocio, Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.